

Михаил Юрьевич Лермонтов,

Monumento

tradukita de Сергей Григорьевич Рублёв

Mi kreis nun por mi mirindan monumenton.
Ĝi estas al popol' eterna mia don',
Kaj ĝi per alta kap' superas eminenton'
De l' Aleksandra glor-kolon'.

Ne tute mortos mi! Anim' en kara liro
Pluvivos post la korp', ne estos ĝi mortont',
Kaj ĉiam famos mi, dum vivos la inspiro
De unu eĉ poet' en mond'.

La tuta vasta land' min gloros kun efiko
Kaj ĉiu naciari' tre bone konos min:
Fiera slava nep', kalmuko step-amiko,
Tunguz' sovaĝa nun kaj finn'.

Kaj longe amos min popolo kun sincero,
Ĉar vekis mi per lir' bonecon de l' anim',
Ĉar en severa temp' mi kantis pri libero
Kaj vokis la indulg' sen tim'.

Diecan volon, muz', obeu kaj ne spitu,
Ne zorgu pri la kron', ne timu pri insult',
La kalumni' kaj laŭd' vin tute ne ekscitu
Kaj ne diskutu vi kun stult'.

...

*Traduko de la Rusa poemo “Ехеги monumentum.” de МИХАИЛ ЮРЬЕВИЧ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-16 – †1841-07-27) en Esperanton de СЕРГЕЙ ГРИГОРЬЕВИЧ РУБЛЁВ (Sergej Rublov, *1901 – †1979).*

Arg-948-1910 (2013-12-14 08:10:28)

Tiun ĉi esperantigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la revuo “Moskvaj Novaĵoj”, prov-numero en Esperanto de Aprilo 1989. Pri la tradukinto vidu la retejon “”. Vidu ankaŭ: <http://www.ipernity.com/doc/83707/7197616>. Laŭ informo de s-ano Boris Kolker la tradukinto Sergej Rublev estis elstara sovetia esperantisto kaj brila Esperanto-tradukisto. Li loĝis en la urbo Odeso.